NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
JANUARO 1996

## GENERALA ASEMBLEO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO

Laŭ la tag-ordo aperinta en la decembra numero de Nia Voĉo ni rememoras ke la jara asembleo de nia asocio okazos la 29-an de januaro je la 19.00 horo en Atocha 98-4°.

## ESPERANTO EN EKOMONIO KAJ KOMERCO

MEL apogas ideon de Andrés Martín el Malago rilate sendi adresojn de tutmondaj entreprenoj kiuj uzas esperanton kiel laborlingvo. La Liceo jam sendis al la Cámara de Comercio de Madrid la unuan liston, ricevita de Andaluzia Esperanto Unuiĝo.

## FUNDACIÓN ESPERANTO

Dum la Hispana Kongreso, Juan A. Cabezos, parolis pri la nova leĝo rilate fondaĵojn kaj pri la sanĝo de statutoj por adakti ilin al la novaj regularoj.
Fundacion Esperanto aljuĝis premion al esperanta traduko de hispana literaturo. La gajninto estis Istvan Ertl pro la traduko de la rakonto "La adiaŭo" originale verkita de Ignacio Aldecoa, li ricevis 10.000 PTA.
Kun la logotipo de "Fundación Esperanto" aperis la unuajn eldonon de la novaj libroj de M. G. Adúriz "Esperanto. Curso del idioma internacional" kaj A. Marco "Lirikaj perloj de Al-Andalus".

## RECENZO: "Esperanto. Curso del Idioma Internacional"

Tiu ĉi libro, vera omaĝo memore al la pedagogia metodo de samideano Pedro Nuez, uzas kaj saĝe kaj estetike materialon de la inspirinto, modernigas la enhavon kaj la prezentadon de sia malnova baza kurso, kaj aldonas al ĝi belegajn desegnojn kaj utilajn indekson. La farita renovigado estus certe ŝatinta al samideano Nuez, ĉar la teksto konservas la esencon de la originalo, kaj ĝi aldonas la necesajn elementojn por faciligi modernan memlernadon de Esperanto. Gratulon al Miguel Gutierrez Adúriz pro sia inteligenta kaj utila laboro!. (Juan Carlos Ruiz)

## AL-ANDALUS

Antonio Marco prezentis sian libron "Lirikaj perloj de Al-Andalus" en la Centra Oficejo de HEF. Li entuziasme kaj majstre parolis pri la kultura al-andaluza kaj klarigis kelkajn demandoj kiujn la ĉeestantoj faris post la parolado. La libro jam havas du eldonojn el du diversaj financ-fontoj.

## HISPANIO

La laboro de D-ro Pérez Óvilo rilate la alvenon de la Nobel Premiito pri ekonomio Prof. Selten al **Murcio** daŭras. D-ro Pérez Óvilo ankaŭ atingis senpagan restadon en hotelo de la ĉeno NH en Madrido kaj inviton por ĵurnal-konferenco kun la ebleco de partopreno de gravaj ĵurnalistoj kiel Luis del Olmo, Gabilondo, Herrero.
Ankaŭ la edzino de Prof. Selten, handikapulino, estas invitata en Murcio por prelegi al diversaj representantoj de murciaj handikapulaj asocioj. ONCE de Madrido oferis adaptitan ĉaron por transporti rul-seĝon kaj la Murcia Federacio for Fizikaj Handikapuloj metass je la dispono de la S-rino militobjetanto por ŝin akompani.

## *HEF ANGULO (Ne oficiale)*

Dum la ĝenerala asembleo oni aprobis jenajn kotizojn por 1996:

| | |
|---|---|
| Socio ordinario ................. | 3.300 PTA |
| Socio protector .................. | 6.600 " |
| (a extinguir) Jubilado .......... | 2.650 " |
| Asociación ...................... | 6.600 " |
| Asociación (10 ejemplares Boletín) | 16.500 " |
| Socio vitalicio ................ | 220.000 " |

HEF-CO petas al ĉiuj hispanaj esperantaj grupoj, ke ili sendu novaĵojn pri ĝiaj aktivaĵoj aŭ pli bone kopion de la jara (1995) raporto. HEF-CO uzos ilin por prepari oficialan 1995an memoron de HEF por presenti al la Ministerio pri Internaj Aferoj.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4º**

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

Ĉe la kafejo Villa de Madrid, en Plaza de Colón (sub la ĝardeno), okazas parolrondo la 1-an kaj 3-an merkredojn de ĉiu monato. Je la 19.00 horo. Kutime gvidas ĝin Ana Manero.

Kursoj: Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18
Sindikato CNT. Merkrede je la 19.00 h. Magdalena 29.

EKDE MEZ-JANŬARO OKAZOS BAZA KURSO EN HEF-CO. Telefonu 446 80 79

Venontaj prelegoj ĉe la Liceo, je la 19.00 horo.
15a de janŭaro. "Sant-Petersburgo, la norda Venezio". Alexandro Nekov
5a de februaro. "Madridaj fungoj". J.C. Ruiz.

## LOTERIO 1995

La estraro de la Liceo tre dankas malavaran donacon de Paco Jiménez Bullón, samideano el loĝanta en Almeria, kiu permesis fari la kajeretojn de la Kristnaska Loterio. Ankaŭ ni dankas al ĉiuj Liceanoj kaj simpatianoj kiuj disvendis amase nian numeron .... malgraŭ la nuna krizo.

## HISPANA DELEGACIO DE UEA

Juan Azcuénaga deziras lasi sian ĉef-delegitecon de UEA. En la asembleo de HEF interkonsentis ke Centra Oficejo estos la sidejo de la hispana delegacio de UEA.
Madrida Esperanto-Liceo deziras gratuli al samideano Acuénaga sian efikan kaj konstantan laboron dum multaj jaroj.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

3a Amerika E-Kongreso. 12-17 februaro. San José (Costa Rica)
81a Universala Kongreso de Esperanto. 21-28 julio Prago (Ĉekio)
**VALENCIA ESPERANTO-GRUPO ORGANIZAS DU KARAVANOJN AL PRAGO. (96) 384 96 16**
55a Hispana Esperanto Kongreso. 19-23 julio. Murcio

## ZAMENHOFA BANKEDO

Kiel tradicie okazos en decembro ni festis la naskiĝitago de Zamenhof. 43 esperantistoj kaj simpatianoj bankedis en la Hotelo Puerta de Toledo. Post la manĝo, laŭ invito de nia Prezidanto Juan Carlos Ruiz, S-ro Flores rakontis kiel li esperantiĝis kaj fondis Liceon kun Feliz Gómez kaj aliaj malmultaj samideanoj. Inter la partoprenantoj estis niaj amikoj el Ruslando, Aleksandro kaj Nataĉa, kaj kompreneble la familio Casquero kiu vogajis ekde Valencio por festi kun madridanoj la Zamenhofa Tago. Por fini la feston Marcelina, la edzino de S-ro Figuerola, kaj Miguel Fernández kantis kiel omaĝo al niaj gastoj kaj finfine membroj de la koruso "Verda Stelo" adiaŭis nin per la belega kanto el Krimujo "Tra l'tuta nokt'".

## NUPTA FESTO

Je la fino de decembro nia karega Mamen edziniĝis en Madrido. Ni deziras feliĉon kaj longan kunvivon al la novaj geedzoj.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

## VIZITAS MEL

Dum sia restado en Madrido pro laboraj kialoj, vizitis MEL-n José Mª Rodríguez, redaktoro de "Gazto Andaluzia" loĝanta en Córdoba; li parolis pri la andaluzia esperanto-movado.

## INFORME ECONÓMICO DE ESPERANTO-LICEO DE MADRID. 1 9 9 5

Atocha 98-4°. 28012 Madrid

GASTOS E INVERSIONES

| | |
|---|---|
| Biblioteca | 14.115 |
| Correo | 15.924 |
| Mantenimiento | 2.000 |
| Alquiler | 355.111 |
| Libros | 35.279 |
| Suscripcion a revistas | 22.600 |
| Cuotas MEL (HEF,UEA, etc) | 11.000 |
| Publicidad | 5.000 |
| Edición "Nia Voĉo" | 15.000 |
| Luz | 16.685 |
| Teléfono | 21.426 |
| Comisión banco | 350 |
| Devolución cuotas de socios | 7.624 |
| TOTAL GASTOS E INVERSIONES | 522.114 PTA |

ESPERANTO
Liceo de Madrid
Atocha, 98 - 4.º
28012 - Madrid

INGRESOS Y VENTAS

| | |
|---|---|
| Libros | 29.246 |
| Libro "E-0 fenómeno" (81 ejs) | 82.703 |
| Cuotas de socios 1995 | 117.000 |
| Cuotas de socios 1996 | 8.000 |
| Socios colaboradores | 220.000 |
| Suscripciones Nia Voĉo | 8.350 |
| Otras ventas | 14.792 |
| Insignias (36) | 10.500 |
| Donativos | 27.007 |
| Loteria 1995. Beneficio neto | 182.780 |
| Gestiones diversas | 1.240 |
| Intereses banco | 160.081 |
| TOTAL INGRESOS Y VENTAS | 861.699 PTA |

**RESULTADO DEL EJERCICIO (beneficio) 339.585 PTA**

Tesorería:

| | |
|---|---|
| c/c banco Atlántico a 27-12-1995 | 839.002 PTA |
| cuenta en UEA-Rotterdam | 9.526 " |
| Depósito a plazo | 2.000.000 " |
| **SALDO ......** | **2.848.528 PTA** |

El **presupuesto** que se presentará para aprobación en la Asamblea, de acuerdo con los ingresos y gastos habidos en este ejercicio, será similar al del pasado año (650.000 PTA aproximadamente)

## JADRAQUE

Unu jaro pli la esperanta koruso Verda Stelo partoprenis en la jam fama festo". Dek sep personoj, inter ili diversaj membroj de MEL, partoprenis en la fama konkurso pri kuirado de panpecetoj ("migas"). Bedaŭrinde niaj samideanoj ne atingis premion sed ĉiuj amuziĝis en la agrabla etoso de tiu-ĉi vilaĝo de Guadalajara.

PRAGO

81-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
20-27 Julio 1996
Prago, Ĉeĥa Respubliko

# GRUPO ESPERANTO DE VALENCIA ORGANIZAS KARAVANON AL PRAGO

*******


Por ĉeesti la UK-n en Prago, Grupo Esperanto de Valencia klopodos organizi karavanon. Laŭ informoj de diversaj vojaĝagentejoj la kosto, proksimuma, estos la jena:

**ELEKTO 1 (per aŭtobuso):**

Foriro: 14-a de julio 1996. Haltoj por dormi en Niza (Francio) kaj Venecia (Italio), en hoteloj kun matenmanĝo. Alveno en Poprad (Slovakio) la 16-a de julio. Tie partopreno en la 6-a Internacia Esperanto-Kongreso, kaj 6-a Eŭropa Esperanto-Forumo. Tie estos prezentataj la 7-an Internacian Esperanto-Kongreson kaj 7-an Eŭropan Esperanto-Forumon, kiu okazos en Valencio en la jaro 1997.
En Poprad ni restos ĝis la 20-a de julio, kaj ni havos la eblecon ĝui la naturajn mirindaĵojn de tiu belega lando, en esperantista etoso, kun ebleco partopreni diversajn belajn ekskursojn. Tie la restado estos en plena pensiono, kaj estas inkluzivita la kongreskotizo.
La 20-a de julio ni alvenos en Praga, kie ni restos en hotelo kun matenmanĝo ĝis la 28-a. Post la fino de la UK ni foriros al Hispanio, denove per nia aŭtobuso, kun haltoj en hoteloj por dormi, kun matenmanĝo, en Zurich (Svislando) kaj Nimes (Francio). Alveno la 30-a de Julio.
La prezo estos ĉirkaŭ 60.000 pesetoj. Ni ankoraŭ serĉas pli bonajn prezojn, kvankam ĉi tiu estas sufiĉe malalta.

**ELEKTO 2 (per aviadilo)**


Foriro el Valencio per aŭtobuso la 20-a de julio. Alveno en Barcelonon, kaj foriro al Prago per aviadilo, kun alveno la sama tago.
Restado en Prago, en hotelo kun matenmanĝo.
La 28-a de julio foriro el Prago per aviadilo al Barcelono, kaj el Barcelono al Valencio per aŭtobuso.
Prezo ĉirkaŭ 73.000 pesetoj.
Ĉi tiuj prezoj estas por 40-persona grupo.
Se ni ne sukcesas atingi tiun kvanton la prezo po persono plialtiĝus, aŭ tute ne eblus organizi la karavanon, irante ĉiuj al Prago unuope.
Pro tio ni petegas ke tiuj kiuj interesiĝas pri la vojaĝo kontaktu nin tuj en Valencio, telefonnumero 3849616.
KONSILO: Tiuj kiuj deziras ĉeesti la kongreson, se deziras ŝpari monon, aliĝu antaŭ la fino de decembro al la UK. Por tiuj kiuj ne estas membroj de UEA, fariĝu almenaŭ Membro kun Jarlibro, kaj ankaŭ ili ŝparos monon.





# *LIRIKAJ PERLOJ DE AL-ANDALUS*

Antonio Marco Botella, unu el niaj plej elstaraj verkistoj, aperigis libron kun la titolo *"Lirikaj Perloj de Al-Andalus"*.
Ĝi estas unu el la plej gravaj verkoj de hispana aŭtoro, kaj ni ĉiuj devas diskonigi la verkon inter esperantistoj kaj ne esperantistoj. Ni, anstataŭ fari recenzon, prenos kelkajn vortojn de la libro, kiuj sufiĉe klare parolas al ni pri la enhavo:
*"Lirikaj Perloj de Al-Andalus estas serioza studo pri la muzulmana Hispanio (711-1492). En ĝi aperas la biografioj de la plej gravaj poetoj de tiu periodo, spicitaj per anekdotoj kaj priskriboj de politikaj eventoj okazintaj en la plej rafinita civilizacio tiama de Okcidento, nome Al-Andalus, bedaŭrinde ne sufiĉe konata. Kelkaj eroj de la nuna verko, unua en Esperanto pri tiel interesa temo, liveras al la leganto la impreson, ke oni legas rakontojn el la MIL KAJ UNU NOKTOJ, kvankam temas ja rigore pri historio...*
*Nur ĝeneraltrajte mi volis skizi per ĉi Enkonduko kelkajn aspektojn de la preskaŭ legenda lando nomata Al-Andalus, kun profiloj vere unikaj, kaj aldoni, ke tiuj pripoeziaj valoroj ne estis la solaj laŭdindaj kaj konindaj de nia lando en tiu epoko. Al-Andalus estis tio kaj multe pli. Unu el ĝiaj plej eminentaj filoj, la granda poeto Ibn Jafayya, dediĉis al ĝi jenajn versojn plenajn de amo kaj fervoro:*



Kombo-ĉambro en Alhambro

AL-ANDALUS, ETERNO-PARADIZO

Ho vi, gent' de Al-Andalus,
kiel vi feliĉa estas!:
Akvo, ombroj, rojoj, arboj,
tia paradiz' eterna
nur en ĉi patri' ekzistas,
en alia lok' ne eblas.
Se mi devus ja elekti,
tiun ĉi, vi estu certa,
ke elektus mi plezure,
ĉar ne estas land' pli bela!
Ho, ne timu! en l' infero
oni ja ne pun-enfermas
la personojn nun ĝuantajn
paradizon plej eternan.

Prezo: 1.900 PTA



Antonio MARCO BOTELLA


# La Tenerifa ŝipo "Esperanto"

(fino el la paĝo 3)

### La ŝipo "Esperanto"

Multe pli longan vivon havis la ŝipo "Esperanto". Dum jaroj albordiĝadis en la haveno de Santa Cruz, plenŝarĝita de bananograpoloj el la norda parto de la kanaria insulo Tenerifo. Post 1934, kiam la hispanaj trupoj okupis la teritorion Ifni, kiu troviĝas kvazaŭ vid-al-vide de la Kanariaj Insuloj, ĉe la okcidenta afrika marbordo la ŝipo "Esperanto" kune kun la aliaj du "ĝemeloj" trasportis inter-lige al tiu kolonio korespondaĵojn kaj plej diversaj varoj.

Nun jam de multaj jaroj "Esperanto" ripozas sur la submara grundo de la rivera haveno en Las Palmas de Gran Canaria: fine de la jaro 1966, post 70 jaroj da marista aktivado, ĝi silente subakviĝis... La ĵurnalisto Albornoz vidis mem la altajn mastojn, elstarantajn el la ondoj proksime de la bordo. Intertempe ĝi estas tute kovrita, pro nova avenuo konstruita apud la marbordo.



La historia foto montras, meze inter du aliaj ŝipoj, la ŝipon "Esperanto, kies teknikaj datumoj estis jenaj: konstrujaro 1896, kilprofundeco 2,26 m, maŝinpovo 140 ĈV, fera ŝelo, ducilindra vapormaŝino, ŝiplongo 42,30 m., pezo 262 tn, rapideco 6 nodojn; droniĝo 1966.

Sed la plej grava "rekvizicia noto" pri la deveno kaj origino de la ŝipo "Esperanto" estas la signifoplena fakto, ke la oficiala dokumento pri ĝia identigo, la Navigacia Matrikulo, estis eldonita de la koncerna oficejo en Malago.

### Esperanto-movado en Andaluzio en 1896

Kia do estis la situacio rilate Esperanton en tiu Andaluzia havenurbo en 1896?

Unu el la unuaj esperantistoj en tuta Hispanio estis ĝuste en Malago José Rodriguez Huertas: li estis aŭtoro de la unua lernolibro por Hispanoj en 1890, fondis la unuan Esperanto-societon en Hispanio en 1891 en Malago (la kvinan de la mondo, post Nurenbergo 1888, Munkeno, Friburgo kaj Uppsala), kaj instruis Esperanton kun granda entuziasmo en Malago dum la unuaj kursoj en Hispanio.

Krome, tiutempe inter la estraranoj de la hispanaj komunumoj estis regule kvar en jenaj pozicioj: la sacerdoto, la kuracisto, la urbestro kaj reprezentanta instruisto. J.R. Huertas estis la instruisto kaj, eĉ pli, li estis persona amiko de hispana deputito. Sekve, do, en Malago, J.R. Huertas estis elstara personeco kun tiom bona reputacio, kun tia aŭtoritato kaj kompetenteco, ke oni senrezerve povas atribui la nomigon oficialan de la ŝipo laŭ "Esperanto" al la personaj influoj de J.R. Huertas.

**Fontoj:** Bazaj inf., historia metarialo, foto: F.J. Dávila Dorta; Lit.: "Enciklopedio de Esperanto " 1933/34, "Analoj de la Esperanta movado en Hispanio, 1987, eld. A.M. Botella, Soc. "Frateco", Zaragoza; "Kongresa Libro" de la 51-a Hisp. Kongr. de Esperanto, julio 1991.

EL LA HISTORIO HdE 95-06-15

# La Tenerifa vaporŝipo Esperanto

Hugo Röllinger

Depost mia unua invito fare de la karmemora Profesoro J. Régulo-Pérez en 1970, gastprelegi en la Universitato de La Laguna, ankoraŭ ofte ripetiĝis tiaj invitoj al Tenerifo. En 1991 mi legis en la Kongresa Libro de la 51-a Hispana Kongreso de Esperanto en La Laguna tiujare, pri "La ŝipo Esperanto" konstruita en 1896. Kompreneble, tre interesita pri la detaloj, mi intervjuis la raportintan esperantiston, tiaman prezidanton de la loka Esperanto-Societo, Francisco J. Dávila Dorta. Anticipe li donis al mi fotokopion de paĝo el la gazeto "El Dia" (La tago), de la23.IX.1990, kun artikolo pri la historio de la haveno en la ĉefurbo Santa Cruz de Tenerife: en ĝi estis priskribitaj impresoj de la 14-a de oktobro 1920 (!). Jen citaĵo en la traduko:

*"... Je la matena krepusko videbliĝis la alvenanta "Esperanto" kvazaŭ ega "fruktujo" kun multjara kaj bona historio, kiu alvenis de la haveno Puerto de la Cruz kun spektakloriĉa ŝarĝaĵo je grapolegoj da bananoj..."*

### Esploro de historiaj detaloj

Tiam, por esti preciza en ĉiuj historiaj detaloj, Francisco Dávila esploris dum pluraj semajnoj la insulan gazetaron de antaŭ 75 jaroj, iel en arkivoj riceveblan. Jen koncize la enhavo de nia konvesacio pri tiu temo. Francisco Dávila bone konis la intertempe forpasintan, tre konatan ĵurnaliston de la gazeto "El Dia", Juan A. Padrón Albornoz. Pro tio kun aparta intereso li legis tiun ampleksan, supre cititan artikolon pri diversnaciaj ŝipoj, kiuj regule vizitadis la ĉefurban havenon. Por eĉ pli detale esplori la faktojn, F. Dávila petis alian esperantiston, Aŭrelio Solis Pi el Santa Cruz, daŭrigi la enketadon. Kaj jen kion rakontis A. Solis Pi.

### Tri ĝemelaj ŝipoj

Tiam en la kanaria mara teritorio i.a. navigadis tri ĝemelaj ŝipoj, apartenantaj al la sama transport-entrepreno; iliaj nomoj estis "San Carlos", "Consuelo de Huidobro" kaj "Esperanto". Por la unuaj du la ekzistado finiĝis malfeliĉe: "Consuelo" koliziis kontraŭ alia kaj dronis. Pli stranga estis la sorto de "San Carlos": dum la dua mondmilito ĝi transportis petrolon al la germanaj submarŝipoj - ĉe la bordo de la insulo Fuerteventura estis por ili instalita sekreta provizejo. Tie, laŭdire, la ŝipon torpedis la angla submarŝipo.

Sed kio vere okazis, estas eĉ pli stranga: ĉar ne la angla, sed erare la germana submarŝipo torpedis tiun hispanan helpŝipon! Feliĉe, ĉiuj maristoj povis esti savitaj.

**(Fino sur paĝo 4)**


**ATENTON, MALFORTVIDANTOJ!**

Vi povas senpage ricevi *KONTAKTO* voĉlegitan. Necesas nur sendi du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.






**Ĉu KONTAKTO plaĉas al vi?**

**Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto – abonu ĝin mem! Se vi estas kursgvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!**

ABONTARIFO 1996

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | 31 | dolaroj | Francio | 125 | frankoj | Nederlando | 41 | guldenoj |
| Aŭstrio | 245 | ŝilingoj | Germanio | 37 | markoj | Norvegio | 150 | kronoj |
| Belgio | 765 | frankoj | Hispanio | 2300 | pesetoj | Pollando | 20 | guldenoj |
| Brazilo | 20 | guldenoj | Israelo | 32 | guldenoj | Portugalio | 2500 | eskudoj |
| Britio | 16 | pundoj | Italio | 34000 | liroj | Svedio | 185 | kronoj |
| Danio | 150 | kronoj | Japanio | 2880 | enoj | Svislando | 31 | frankoj |
| Finnlando | 115 | markoj | Kanado | 31 | dolaroj | Usono | 23 | dolaroj |



**nia voĉo**

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO

DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:

c/ ATOCHA n°98. MADRID - 28012

Hacia dónde vas pastora?
_ Voy corriendo hacia Belén...
¿Quieres que vaya contigo?
- Si eres creyente, sí ¡Ven!

Y cogidos de la mano
y cantando villancicos
a los sones del rabel,
van alegres por el campo
caminito de Belén.

Quiero que todos vosotros
sintais, como la pastora,
la llamada de la Fé.
Que no seais rencorosos
y que os lleven los pies,
las manos y el corazón
hasta el Portal de Belén.

NAVIDAD 95

acia do...e vas pastora?
_Voy corriendo hacia Belén...
¿Quieres que vaya contigo?
_ Si eres creyente, sí ¿Ven!

Y cogidos de la mano
y cantando villancicos
a los sones del rabel,
van alegres por el campo
caminito de Belén.

Quiero que todos vosotros
sintais, como la pastora,
la llamada de la Fé.
Que no seais rencorosos
y que os lleven los pies,
las manos y el corazón,
hasta el Portal de Belén.

NAVIDAD 95

Hacia dónde vas pastora?
_ Voy corriendo hacia Belén...
¿Quieres que vaya contigo?
- Si eres creyente, sí ¡Ven!

Y cogidos de la mano
y cantando villancicos
a los sones del rabel,
van alegres por el campo
caminito de Belén.

Quiero que todos vosotros
sintais, como la pastora,
la llamada de la Fé.
Que no seais rencorosos
y que os lleven los pies,
las manos y el corazón
hasta el Portal de Belén.

NAVIDAD 95

Lucrecia San Antonio

acia donde vas pastora?
_Voy corriendo hacia Belén...
¿Quieres que vaya contigo?
_ Si eres creyente, sí ¿Ven!

Y cogidos de la mano
y cantando villancicos
a los sones del rabel,
van alegres por el campo
caminito de Belén.

Quiero que todos vosotros
sintais, como la pastora,
la llamada de la Fé.
Que no seais rencorosos
y que os lleven los pies,
las manos y el corazón,
hasta el Portal de Belén. NAVIDAD 95 ¿Hacia dónde vas pastora? ¿Hacia dónde vas pastora?